La Riverego
kebekia esperantista bulteno
Julio 2003 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 17

# Mi bostonis !

Jen mi partoprenis komence de julio 2003, en la 51-a Jarkongreso de ELNA) (usona Esperanto-asocio) kaj verdire mi ŝatis la sperton.

Iom pli ol 70 homoj el Usono, Kanado (7), Domingo (1), Meksikio (1) Brazilo (1) kaj Britio (1) ĝuis la bonan programon kiu okazis ĉe MIT en Cambridge apud Bostono.
Mi rakontu al vi tion, kio okazis dum la kongreso. La interkona vespero estis unue simpla interbabilado kaj laŭ mi tio ne tiom taŭgas por novuloj kiuj ne konas iun. Estus necese atenti ilin, por ke ili ne sentu sin solaj. La dua parto de la vespero estis pli bona ĉar ni iris al trinkejo kaj tie, Kim (el Danio) kantisto el la grupo Esperanto-Desperado kaj JoMo (el Francio), koncertis duope kaj diverslingve. Mi fakte iris al Bostono por sperti tion ĉar maloftas la okazoj aŭdi profesiajn esperantistajn kantistojn en Ameriko.
Post la solena malfermo (sen kantado de la esperanto-himno) okazis bonegan prelegon de Profesoro Humphrey Tonkin (vicprezidanto de Universala E-Asocio) pri "Esperanto : Kio nun kaj kio poste?" Mi vere ĝuegis lian prelegon. S-ro Tonkin tiom bele kaj bone parolas la lingvon, ke estas vera prezuro aŭskulti lin. Liaj diroj estis aparte interesaj ĉar la Esperanto-movadoj devas trairi metamorfozon en la venontaj jaroj. Mi sendube prezentos liajn pensojn al la estraro de ESK en septembro.
Vendrede posttagmeze, estis: kunsido de ELNA, junuleca amuzo, lingva forumo, Ni verku hakojn, semiotiko, studentaj petolaĵoj ĉe MIT, Kio estas memoro?, internacia krimtribunalo kaj pikniko por la vespermanĝo sekve de publika ekstera koncerto de Kim kaj JoMo en deko da lingvoj kaj fine piroteknikaĵoj por festi la nacian tagon de Usono.
La sabato same plenis je aktivecoj. Matene eblis grupete ekskursi laŭ la pado de libereco en la malnova Bostona. La loka kongresa komitato tradukis la historiajn informojn al Esperanto kaj pretigis belan koloran gvidileton. Vere instruas sperto pri la historio de Bostono kaj ankaŭ de Usono. Posttagmeze oni povis elekti inter: kunsido de ELNA, konversacia rondo, Amerika Esperanto-movado kaj aparte en Domingo, traduka deklamo, Esperanto-kulturo kaj muziko, kiel organizi landan kongreson, unuiĝo de Ĉinio, vidbendo Familio Bonvolo, Esperanto en lernejoj, beginning Esperanto course, ktp. Vespere estis la bankedo kaj poste balo kies muzikistoj estis JoMo kaj Kim.
La dimanĉa programo enhavis movadajn kunsidojn, konversacian rondon kaj la fermon kun kantado de la himno. Dudeko da homoj kolektiĝis ĉe fiŝrestoracio antaŭ adiaŭi kaj ĝisi. En 2004 la kongreso okazos en Sidney, B.K. ĉe Vankuvera Insulo.
Gratulon al Jacob Schwartz kiu estis la ĉeforganizanto kaj kiu sukcesis pretigi bonegan kongreson. Laŭ mi, ili pretas nun por organizi la Internacian Junularan Kongreson (IJK) de TEJO.

**Normand Fleury**

## Kalendaro, septembro-decembro

La kunvenoj en Montrealo okazas la lastan vendredon je la 19:30 ĉe la Montreala E-domo, 6358 rue de Bordeaŭ, Montrealo. Metroo Beaŭbien, Buso 18 Orienten aŭ Metroo Fabre kaj Buso Papineaŭ Suden.
-26a de Septembro ĉe MEDO
-Deka Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo, Ludlow, Vermonto. Vidu nian retejon por la detaloj. Venu sperti Esperantion en internacia etoso.
-31a de oktobro ĉe MEDO
-28a de novembro ĉe MEDO
-13a de decembro – Zamenhofa festo, kunportu pladon por la komuna bufedo je la 18a horo. ĉe MEDO

# OKEMO TRANSLOKIĜU AL KANADO

*Unue aperis en "Inter Ni", bulteno de la Esperanto-Grupo de Halifax-Dartmouth*

**Yves Bellefeuille**

Mi naskiĝis en Cornwall, en Ontario, unu kilometro for de Usono, kaj ofte estis en tiu lando. Sed nun mi neniam plu volas iri al Usono.

Mi timas Usonon; mi timas esti en Usono. Usono nun estas tia lando kie oni povas esti en malliberejo dum jaroj, sen akuzo, sen la rajto paroli kun advokato, kaj sen la rajto vidi diplomatian reprezentanton se oni estas eksterlandano.

Mi pensas pri Maher Arar el Otavo, mia urbo. Li vojaĝis de Tunizio al Montrealo. Li havis sian kanadan pasporton. Malbonŝance li transitis la flug-havenon Kennedy, en Nov-Jorko. Usono kaptis lin kaj elĵetis lin en Sirion, tiu sama lando kiun ĝi nun nomas "bandita lando" kaj "terorisma ŝtato". Almenaŭ oni pensas ke tiel okazis, ĉar Usono ne volas diri, kie li nun estas. Oni ne plu havas novaĵojn de li. Amnestio Internacia nun konsideras, ke li estas inter tiaj homoj pri kiuj policistoj interesiĝis kaj kiuj poste "malaperis".

Mi pensas ankaŭ pri Liban Hussein, ankaŭ el Otavo. Dufoje tage mi veturas antaŭ lia vendejo, survoje al mia laborejo. Laŭ peto de Usono, Kanado akuzis lin pri tio, ke li kolektis kaj donis monon por terorismaj celoj. Post 150,000$ da advokataj kostoj, juĝisto decidis ke estis absolute neniu pruvo pri tio. Almenaŭ li rajtis al decido de juĝisto. Usono ne plu volas agnoski la Konvenciojn de Ĝenevo. Ĝi eĉ ne plu volas agnoski siajn proprajn leĝojn kaj malliberigas homojn eksterlande por eviti ilin.

La kontaktoj inter la kanada kaj la usona movadoj estas surprize maloftaj. Normand Fleury el Montrealo havis vere bonan ideon kiam li sugestis, antaŭ deko da jaroj, ke okazu komunaj renkontiĝoj en Okemo, en Vermonto. La loko estas konvena por esperantistoj el Nov-Jorko, Montrealo, Otavo, kaj aliaj lokoj. Krome, Normando zorge elektis daton kiu konvenas al kanadanoj kaj usonanoj, ĉar ĝi okazas dum longa semajnfino en ambaŭ landoj — la dank-festa semajnfino ĉe ni, kaj la Kolombo-festo en Usono. Mi iris al Okemo kaj ĝuis la renkontiĝon, kaj mi rekomendis al aliaj homoj ke ili ankaŭ ĉeestu ĝin.

Sed mi ne plu volas iri al Okemo, kaj mi ankaŭ ne plu povas varbi al aliaj esperantistoj ke ili iru tien. Kiel mi povas diri al samideano kaj samŝtatano ke li iru al Usono, sciante ke tiu lando tute malkaŝe diskriminacios kontraŭ li pro la loko kie li hazarde naskiĝis? Kiel mi povas inviti al esperantisto kiu hazarde naskiĝis en Libano aŭ Egipto ke li iru al Usono, sciante ke homoj kiel li tuj iris en malliberejon kiam ili provis obei al usona leĝo kaj registriĝi ĉe policejo?

La komuna kanada-usona renkontiĝo ne plu povas okazi en Okemo. Venis la tempo, ke ĝi translokiĝu al la alia el la partneraj landoj.

**Yves Bellefeuille**

## OKEMO kaj MeKaRo.

Estas dubinde, ke OKEMO iam transloĝiĝos al Kanada. Unue, la nomo mem devenas de la gastejo... Due, iu ajn loko en Kanado estas tro malproksima de la celataj E-grupoj: Bostono, NovJorko, Montrealo, Otavo.

Tamen, la landlimaj problemoj estas unu el la kaŭzoj, kial Normando proponis organizi MezKanadajn Esperanto-Renkontiĝojn. Bedaŭrinde, malmultaj homoj ĉeestis la unuan, pasintan majon, en Otavo; inter ili, tre malmultis la Otavanoj. Tiel, ni verŝajne demandos nin, ĉu indas pluigi la aferon.

Restos la Reto...

**Sylvain Auclair**

### Ĉu ESKi aŭ ne ESKi?

Ne maltrafu la jaran ĝeneralan kunvenon, okaze de kiu ni diskutos pri la agado pasinta kaj estonta de nia societo, kaj elektos novan estraron. Tiu kunsido estos des pli grava, ke sentiĝas ia laceco en la nuna estraro. Se vi, membroj, kiuj ja estas la Societo, deziras pluigi ĝian agadon aŭ eĉ ekziston, vi devas iel montri tion. Ne ignoru ion tre gravan: la Esperanto-Societo Kebekia faras nenion; nur ĝiaj membroj povas fari ion. Fakte, agadas por Esperanto ĉefe la estraranoj (pli prave oni nomu ilin agadkomitatanoj!), kaj tute senpage. Malgraŭ tio, treege malmultaj membroj eĉ partoprenas en la aktivaĵoj, kaj ni eĉ foje ricevas plendojn anstataŭ helpon. Nu, ĉu plu agadi en tiaj cirkonstancoj? **Sylvain Auclair**

La Riverego (Le Fleuve) est publiée par la Société québécoise d'espéranto six fois par année. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la SQE. Abonnement 10$..
La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia sesfoje dum la jaro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpaga por la ESK-membroj. Abono: 10$CA. UEA-kodo de la ESK: kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2003.09.01, al jessylapointe@hotmail.com.

Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G 2R8
Tel+Fax : 272-0151
esperanto@sympatico.ca
www3.sympatico.ca/esperanto